


Bulgara

ESPERANTISTO





Esperantistoj el Svištov antaŭ la monumento de la pereintaj kontraŭfaŝistoj en v. Pejčinovo (vd. p. 13)



Esperantista krono pro la heroaĵo de la sovetaj soldatoj apud Klajpeda (vd. p. 15)



ENHAVO

* * *	La Aprila Ribelo	1
Haim Levi.	Evento de historia signifo .	3
Ivan Vazov.	Koĉo. Traduko de Simeon M. Simeonov	4
Zahari Stojanov.	El „Notoj pri la bulgaraj ribeloj“	5
Ivan Veselinov.	La homo, kiu donis la signalon	9
Stojan Kostadinov.	Miaj geavoj rakontas .	10
Maria Panova.	75-jara jubileo de la E-movado en Plovdiv	12
Sider Pavlov.	Aktiveco de „Danuba Stelo“ .	13
Ivan Severnjaŝki.	Aktiva E-societo	14
Inĝ. P. Petrov.	E-ekspozicio en Drjanovo .	14
Ana Mindova.	Bona tradicio enkadre de SIA	14
Aristids Medinŝ.	E-novaĵoj el Riga	14
H. Vajtkeviĉius.	La esperantistaro de Klajpeda honoras pereintajn heroojn .	15
K. Vălev.	Ĥi kongreso de la ĉefaj esperantistoj	16
Miloslawa van der Notrs-Kolinska.	Bulgara-nederlanda amikeco	16
Dobri Ĉintulov.	Vento bruas (kanto). Tradukis St. Kiraĝiev	III

Sur la kovrilpaĝo:

La monumento en Oboriŝte (en Sredna Gora). Tie la 14-an de aprilo 1876 okazis la Unua Nacia Kunveno de la bulgara popolo, preninta la historian decidon pri ribelo kontraŭ la otomana jugo (1396—1878)

Redakta Komitato: Kunĉo VĂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krăstju KARUCIN, Haim LEVI.

Administra sekretario kaj korektanto:
Minko CONKOVSKI

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

Geiernantoj 12—14-jaraj kun sia instruistino Ĉirpanska deziras korespondi tutmonde. Komununa adreso: Velurina Ĉirpanska, učiliŝte „D. Blagoev“, 4831 Dospat, Smoljansko, Bulgario



LA APRILA EPOPEO

Kontraŭ la nigra otomana jugo (1396—1878) la bulgara popolo batalis senĉese. Kulmino de tiu batalo estas la glora Aprila Ribelo de 1876 j.

La Aprila Ribelo eksplodis ĉe konkretaj historiaj kondiĉoj. La evoluo de la bulgaraj regionoj sub la otomana jugo dum la dua duono de la XIX-a jarcento karakteriziĝas per notinda ekonomia supreniro. Fondiĝis kaj funkciis fabrikaj entreprenoj, en kiuj laboris miloj da bulgaroj, speciale en la loĝlokoj situantaj en la piedoj de la Balkano.

La disvolviĝo de la tutbulgara merkato kontribuis la estiĝon de favoraj kondiĉoj por formiĝo de nacia konscio, por unuiĝo de la popolaj fortoj en batalo kontraŭ la eksterlandaj konkerintoj.

Peze vivis la bulgara popolo sub la fremda jugo. Sed aparte pezaj estis la kondiĉoj en la vilaĝoj. Laborante la teron per tute primitivaj iloj, la vilaĝanoj devis pagi ne laŭfortajn impostojn. Al ili la regantoj rilatis kiel al brutoj.

Super la tuta bulgara popolo pezis la malnoviĝinta turka feŭda sistemo, la politika kaj religia jugoj. Tial en ĝi naskiĝis kaj maturiĝis fortoj por amasa revolucia movado.

Post la fiasko de la Ribelo en Stara Zagora en novembro 1875, en urbo Giurgiu (Rumanio) la bulgaraj elmigrintoj fondis novan revolucionan centran komitaton, kiu komencis preparon de nova ribelo en la bulgaraj regionoj. Tiu komitato dividis la landon en 4 revoluciajn distriktojn — Târnovo (la unua), Sliven (la dua), Vraca (la tria) kaj Plovdiv (la kvara — kun sidejo en Panagjuriŝte). Por ĉiu distrikto estis nomita apostolo, lia helpanto kaj batalinstruکیanto, kiuj devis organizi la popolon. En la preparlaboroj partoprenis ĉiuj aĝoj — junuloj, maljunuloj, infanoj. Unuj sin preparis por armita batalo, aliaj kudris vestojn, standardojn, triaj preparis kuglojn, lignokanonojn, kolektis nutraĵojn. Ĉiuj estis inspiritaj de unu deziro, de unu penso — liberigi sin!

La 14-an de aprilo 1876 (laŭ la malnova stilo) en la loko Oboriŝte kvara revolucia distrikto organizis kunvenon de reprezentantoj de ĉiuj revoluciaj komitatoj, en kiu oni raportis pri la faritaj laboroj, pri-traktis la tutan situacion kaj decidis proklami la ribelon je la 1-a de majo. Kiel centro de la ribelo estis fiksita Panagjuriŝte.

Sed por eviti arestojn la revolucia komitato en Koprivŝtica frunte kun Todor Kableŝkov proklamis la ribelon pli frue — la 20-an de aprilo. Dum nelonga tempo ribelis la tuta kvara distrikto. Ekmoviĝis ankaŭ la aliaj — plej aktive la distrikto de Târnovo kun la fama taĉmento de Baĉo Kiro kaj popo Hariton, la ribelo en la regiono de Gabrovo—Sevlievo ka.



*Kun la Aprila Ribelo por ĉiam ligis siajn nomojn la karaj popola-
iloj Panajot Volov, Georgi Benkovski, Todor Kableŝkov, Vasil Petleŝkov
Koĉo Ĉestimenski, Baĉo Kiro k. a.*

*Unu monaton preskaŭ en la tuta bulgara lando bolis batalo. Sed la
armiloj de la bulgaroj estis primitivaj kaj ili malgraŭ sia heroeco ne povis
elteni kontraŭ la multoble pli granda kaj moderne ekipita sklaviginto. La ri-
belo estis frakasita kun eksterordinara krueleco. La bulgara loĝantaro estis
amase pafmortigata, forbuĉata. La kruelaĵoj atingis sian kulminon en la vila-
ĝoj Peruŝtica, Batak, Bracigovo. En la preĝejo de Peruŝtica estis sieĝitaj
tutfamilie ĉ. 600 homoj — geviroj, maljunuloj, infanoj. Por ne fali en la
manojn de la kruela malamiko multaj preferis mortigi sin mem. Tiel agis
Koĉo Ĉestimenski, Spas Ginev k. a. En Batak oni mortigis ĉion vivan — 7000 ho-
mojn, kaj bruligis la tutan vilaĝon. En Bracigovo post la malvenko la loka revo-
lucia gvidanto Vasil Petleŝkov estis forbruligita viva sur ŝtiparo. Ĝis la
lasta spiro tamen li rebatis la proponojn denunci siajn kunbatalantojn, res-
pondante firme: „Mi estas sola!“ Dum la tuta ribelo estis mortigitaj pli ol
30 000 gebulgaroj, pli ol 10 000 estis malliberigitaj kaj ekzilitaj. Ĉirkaŭ
80 loĝlokoj estis cindrigitaj, aliaj 200 forrabitaj. La morto furiozis en la
tuta bulgara lando.*

*La otomanaj kruelaĵoj ĉe la frakaso de la ribelo ne restis nerimarkitaj
en Eŭropo. Unue la rusa gazetaro jam en la fino de aprilo informis pri ili kaj
apelacis al la eŭropa publika opinio postuli respondecon de la otomana registaro.
En Rusio la kampanjo defende al la bulgara popolo estiĝis plej vasta kaj
impona, ĝin partoprenis ĉiuj socitavoloj kaj politikaj movadoj. Tra tuta Rusio
okazis spontanaj mitingoj, oni kolektis monon por helpi la suferantan fratan
bulgaran popolon. Verkistoj kiel L. N. Tolstoj, F. M. Dostoevskij, I. S. Tur-
genev, V. M. Garŝin, Nemiroviĉ-Danĉenko k. a., sciencistoj kiel D. Mende-
leev aŭdigis proteste voĉojn.*

*Movadoj de solidareco kun la bulgara popolo komenciĝis en ĉiuj slavaj
landoj — ĉe slovakoj, ĉeĥoj, poloj, slovenoj, kroatoj. Aparte fortaj estis tiuj
ĉi movadoj en la najbaraj landoj — Serbio, Rumanio, Monte Negro, Grekio.
Subtenis la bulgaran popolon ankaŭ la progresema itala socio frunte kun Ga-
ribaldi — la granda revoluciulo kaj batalanto por libera, unuigita Italio. Ne
restis indiferenta la publika opinio ankaŭ en Francio kaj Anglio — tiuj du
tradiciaj protektantoj de la Otomana Imperio. En Anglio la liberala opozicio
frunte kun Gladston deklaris sin kontraŭ la politiko de la konservativa regi-
staro, kiu protektis la otomanan registaron kaj klopodis kaŝi la veron pri la
teruraĵoj en Bulgario. La granda franca verkisto Victor Hugo defendis la
rajton de la bulgaroj batali por sia libero kaj alvokis demokratian Eŭropon
meti finon al la sklaveco en la Otomana Imperio.*

*La aktiva subteno de la demokratia liberama publika opinio en tuta Eŭropo
malhelpis al la reakciaj fortoj defendi la otomanan registaron kaj kontraŭstari
al Rusio en la decida horo. Kaj tiu horo venis: post iom pli ol unu jaro al-
flugis la „nordaj agloj“ — la soldatoj de la frata rusa popolo, kaj en ven-
koplana militiro forbalais la 500-jaran tiranecon.*

*La granda merito de la aprilribelantoj konsistas en tio, ke ili altiris la
atenton de Eŭropo kaj antaŭ ĉio de Rusio al la bulgara problemo. La sen-
kondiĉa solidareco de la eŭropa demokratia socio kun la afero de la bulgara
naciliberiga revolucio diskreditis kaj izolis la Otomanan Imperion. La bulgara
libero naskiĝis lumita de la aprilaj incendioj kaj la venkaj salvoj de la*



EVENTO DE HISTORIA SIGNIFO

En aprilo socialisma Bulgario notas la 20-an jariĝon de historie grava evento — la Aprila Plenkunsido de CK de la Bulgara Komunista Partio (1956).

Tiu plenkunsido de la partio-gvidanto de nia lando prenis decidojn, kiuj fariĝis bazo por ĉiuj grandegaj sukcesoj de PR Bulgario dum la lastaj du jardekoj. La plenkunsido restarigis la Lenin-principojn kaj normojn de partia vivo en la kondiĉoj de socialisma konstruado, decide kondamnis la kulton de la personeco kaj restarigis la principon de kolektiva gvidado en la laboro de ĉiuj partiaj organoj — de la Centra ĝis la baza partia komitato. Tiu ĉi ekskluziva merito de la plenkunsido ludis gravan rolon por malfermo de vastaj eblecoj por krea manifestiĝo kaj iniciatemo fare de la homoj, por plua firmigo kaj florado de la socialisma demokratio. Tiel la socialismo ankoraŭ pli bone, pli brile montris siajn allogon kaj forton, fariĝis inspira ekzemplo por milionoj da homoj kaj popoloj en la mondo.

La Aprila Plenkunsido de CK de BKP ankoraŭ pli brile revivigis la revoluciajn tradiciojn de la Bulgara Komunista Partio, ĝiajn politikajn virtojn, formiĝintajn dum jardekoj. La plenkunsido denove konfirmis kaj evoluigis la aferon de la proleta internaciismo, de la internacia solidareco.

La linio aprobita de la Aprila Plenkunsido bonefikis ĉiujn sferojn kaj agadojn en la vivo de PR Bulgario.

Ĝi vere estis returna momento kiel por unuigo de la partiaj kadroj, por la plua plialtigo de la rolo de la Partio, tiel ankaŭ por atingi eminentajn sukcesojn en la politiko, ekonomiko, kulturo, sociaj problemoj ktp. La jaroj post la Aprila Plenkunsido estis jaroj de bolanta aktiveco, de krea serĉado en la teorio kaj la praktiko de la socialisma konstruado.

La perfektigo de la stilo kaj la metodoj de laboro, la altiro de la laborantoj al decidado de la sociaj kaj ekonomiaj problemoj helpis, ke la aprila linio aparte manifestu sian bonefikan rolon por la evoluigo de la ekonomio, agrikulturo kaj ĉiuj aliaj branĉoj de la popola mastrumo. Ĉi tiuj sukcesoj, kune kun la sukcesoj en la nacia kulturo, scienco, tekniko, klerigo ktp. vicigis Bulgarion inter la plej evoluintaj landoj en la mondo, faris ĝin imitindan ekzemplon por multaj popoloj.

Netakseblan kontribuon por la efektivigo de la aprila linio en rimarkindajn farojn havas la unua sekretario de CK de BKP k-do Todor Ĵivkov, sub kies elporovita gvidado la Partio difinas kaj realigas la grandajn taskojn por konstruado de matura socialisma socio en nia lando.

La XI kongreso de BKP estas nova brila triumfo de la saĝa vivokrea linio, donita de la Aprila Plenkunsido de CK de BKP.

Haim LEVI

rusaj armiloj.

La epopeo de Aprilo 1876 restas por ĉiam neelĉerpebla fonto de pura kaj hela patriotismo por la bulgara popolo. Al ĝi dediĉis plej belajn verkojn multaj bulgaraj poetoj kaj verkistoj.

La heroeco de aprilanoj, ilia amo kaj sindonemo al la popolo inspiris la batalon kontraŭ la kapitalisma ekspluatado kaj faŝisma tiraneco. Ili flamas ankaŭ nun en la koroj de la bulgaroj, kiuj entuziasme konstruas novan, feliĉan vivon en sia por ĉiam libera kaj supreniranta Patrolando.



Poezio kaj beletrio

Ivan Vazov

KOĈO

La defendo de Peruŝtica

Ho, ribelo glora, temp' de apogeo,
de fiera lukto, tagoj de pereoj!
Epoŝeo nigra, fremda al la mond',
epoŝeo plena de bravec' kaj hont'!

En la templo svarmis virinoj, infanoj,
patroj ribelintaj kontraŭ la tiranoj —
ili kolektiĝis pro batala flam',
ĉiuj sian sorton kompreninte jam. . .
Tri tagnoktojn tutajn malamik' ne ĉesis
pafi furioze. Trompoj ne sukcesis,
nek atakoj turkaj, nek la mortminac'.
Sieĝatoj luktis. Pri kapitulac'
pensis ja neniu en la kriza horo,
ĉar sin oni mem makulus per malgloro.
Al forneg' similis la preĝeja lok'
pro l'aervarmego kaj pro la sufok'
kaj la pulva fum'. Malsaton oni sentis —
longe la stomakojn ĝi sen halt' turmentis.
La infanoj kriis, palaj pro terur'
ĉe patrinoj siaj — el kadavroj mur'.

Ene kaj ekstere bolis lukt' kun ard',
brilis stranga fajro en ĉies rigard'.
Sanaj kaj malsanaj, riĉaj kaj malriĉaj,
junaj kaj maljunaj, al mort' sindediĉaj
tie staris kontraŭ malamikoj mil.
Jen patrino krias: «Frapu, mia fil'!
Pafu per fusilo de mi mem ŝargita!»
Jen maljunulino, ĝis mort' lacigita,
portas la kartoĉojn, kvazaŭ en delir'.
Edzo luktas tie en batalinspir',
ĉar malantaŭ li edzin' amata staras,
ŝargas la fusilon, ĝin por paf' preparas.
Pro la tondroj kaj la sango ĉe la mur',
la infanoj ploras, krias en terur',
tiajn pafojn por unua foj' aŭdinte,
kaj ŝprucantan sangon nun ekvidinte.
Bolas la batalo — kiel vera ŝtorm'.
Multaj tie kuŝas en eterna dorm'.
Ŝvebas densa fum', la mort' ne plu teruras —
bela eĉ ĝi ŝajnas. . . Ŝprucas kaj susuras
sang' anstataŭ lakto el patrino mam'.
En l'okuloj brilas de frenezo flam'.
Maljunuloj kuras helpe kun fiero
kaj fusilojn serĉas en batalinfero. . .

Turkoj furiozas, sturmas kun malam',
kaj en la preĝejon jen invadas jam;
hurlas, pafas, krias la sovaĝa hordo,
sed amase falas ĉe l'preĝeja pordo.
Turka komandanto, per sang' ŝprucigita,
ĉe l'rikolt' de korpoj staras konsternita,

timon eksentinte en ĉi tiu hor'
antaŭ tiuj sklavoj kun bravega kor',
kiuj semas morton dum batalo glora. . .

Sed subite tie, laŭ la vojo fora,
kiel uragano montris sin armeo. . .
Jubilas la hordo, dum en la preĝejo
ĉies koro estas preme konfuzita,
kvazaŭ antaŭ iu pugno venĝlevita. . .
La batalo ĉesas. . . Maldensiĝas fum',
kaj eksonas voĉo tra l'tumulta zum':
— Fratoj, ĵus ni staris kontraŭ hordoj fiaj,
ĉar sovaĝaj estas ili kaj rabiaj. . .
Sed armeo venas en batala ord' —
ni kapitulacu antaŭ reĝa fort'!
— Ne! Neniam! Ne! Prefere glora morto
ol rezignacii pri la sklava sorto! . . .
— Ĵetu la pafilojn! — Ne! — Sed kion fari?
— Ĉu kapitulaci? Ne! Plu kontraŭstari!
Inter ni kaj ili ne eblas konkord'! . . .
— Hontu, he! — ekkriis virino kaj pafis
al la trup' sultana, sed ŝin kuglo trafis. . .
Pro la paf' ekstremis lukte la popol' —
ĉies kor' ekbatis pro batala vol'
ĉiuj kun fiero ekstaris ĉe l'pordo.
— Fratoj, ni ne cedu antaŭ turka hordo!
Salvo tondris. Venis jam decida hor',
kaj ekfalĉis kante la fatala mort',
sed ankoraŭ pli tragika kaj terura. . .
Muĝis en la templo mort' malbonaŭgura.
Jam la malespero manifestis sin,
idojn siajn ne rekonis la patrin'. . .
Kontraŭ la preĝejo kanonoj ekstere
fajron vomis kune, kvazaŭ elinfere,
traborante tondre la antikvajn murojn,
same kiel rompas fagojn ŝtorm' terura, —
kvazaŭ tera trem' plurfoje ripetita.

Oni vidis tuj la muron faligita. . .

Peruŝtica pala, de herooj nesto,
glor', eterna glor' al viaj filoj estu
kaj al via tomb' kaj demoj cindriĝintaj,
kie brave mortis sklavoj ribelintaj!
Glor' al vi kaj glor' al via rezistvolo!
En la fumo falis vi kun aŭreolo!
Kontraŭ turka sturmo, en batal' ĝismorta,
levis vi leonstandardon per man' forta;
kapon vi ne klinis, tim' vin ne frakasis,
vi sanktejon vian honte ne forlasis
kaj pro vi sanktiĝis la popollibero. . .
Pro l'viktimoj vi revenĝis kun fiero.
Glor' al vi, ho urbo, lok' el cindroj mur,
atest' pri heroa lukto en terur'!



Vi batalis brave en la kriza horo
 kaj triumfo iĝis via mort' en gloro;
 f l' unika, nova estas falo via —
 notis brilan nomon historio nia:
 sunradias vi en la lazuro for,
 meze de l'mizeroj, meze de l'malglor'!
 Falis vi en tombon brave ĉe l'kaoso,
 gloire, kiel Prago, kiel Zaragozo;
 p lva fum' vin kovris, dronis vi en sang',
 lasta — vi nun staras je unua rang';
 vi ekzemplo estas pri heroa morto,
 indulgon ne petis per humila vorto.
 Nekonata kaj sen fortikaĵ-gigant',
 nur kun nudaj manoj, sen batalgvidant',
 sen pasinto glora, sen ekzemploj grandaj,
 kiuj ĉiam igas la malgrandajn grandaj,
 vi al mort' terura senhezite iris,
 Sparton vi superis, kun Kartag' konkuris!

Al la templo venis la armea forto,
 lasta lukt' ekbolis — proksimiĝis morto. . .
 La kruela hord' — sovaĝa turkfalang' —
 jam avidis je adulto, karno, sang'
 dentojn grincigante. Bomboj tondris bate,
 belulinoj kaj infanoj ploris laŭte.
 La patrinoj en frenezo kaj teruro
 kapojn siajn frapis je la ŝtona muro,
 falis kun harar' taŭzita, kaj aliaj
 en delir' strangolis infanetojn siajn. . .
 Tiam Koĉo, la botist' kun simpla moro,
 ama ribelul', vundita, kun doloro

vokis la edzinon — juna belulino
 kun infan' surbruste. Ĉe l'bata kulmino
 li ekkriis: «Kara, jen la hekatomb',
 kaj. . . la malhonor' — pli fia ol la tomb'...
 Morti ĉu vi volas?» Kaj edzino lia,
 pala, mutiĝinta kaj rezignacia,
 bebon metis teren dum tumult' batala,
 klinis sin kaj kisis la frunteton palan,
 levis sin kaj diris: «Estu ĝi post mi!
 Frapu!» . . . La ponardon tuj enpikis li
 en l'edzinan bruston kaj la sangfontano
 tuj ekŝprucis. Koĉo, kun tremanta mano,
 sin direktis al la beb' ploranta sia:
 «En ĉiel' ne estos sola panjo via!» —
 diris li kaj frapis, kvazaŭ en delir',
 kapon ektorninte flanken, kun sopir'.
 La kapeto falis, la korpet' skuiĝis,
 kaj patrino sango kun beba miksiĝis. . .
 Tiam Koĉo diris: «Por honesta mort'
 kaj por lasta frapo certe restas fort'!»
 Kaj enpikis li en la batantan koron
 la ponardon kaj en agoni-stertoro
 teren falis dorse kun vitra rigard'
 kaj kun elstaranta surbruste ponard'.

En la templo tondris krioj, veoj, ploro,
 inoj falis morte aŭ en malhonoro!

Kaj tra l'densa fumo', el ĉiel', silente
 dio spektis ĉion plej indiferece. . .

El la bulgara: Simeon M. Simeonov

Zahari Stojanov

EL „NOTOJ PRI LA BULGARAJ RIBELOJ“

LA RIBELO EN 1876

PANAGJURIŝTE

(Fragmentoj)


La tago estis la 20-a de aprilo.
 Nenio eksterordinara. Je la 6-a horo
 laŭ turka tempo ni tagmanĝis. Poste
 ni ekdiskutis nian specialan temon. . .
 La estro de la gardistaro, Vorĉo-
 vojvodato, tordis siajn lipharojn laŭ
 vojvodato maniero apud la korta pordo.
 La reskribantoj de la proklamiloj kon-
 kuris, kiu preparos pli da ekzemple-
 roj. La tago estis unu el la plej be-
 legaj. Profunda silento regis en la
 vilaĝo.

Ĉirkaŭ la oka kaj duono laŭ turka
 tempo la kortpordo de baj¹ Ivan mal-
 fermiĝis. . . Mirinde! Kiam ĉiuj funk-
 ciuloj sciis, ke en tiun domon, kie

troviĝas la apostoloj, eĉ duope oni ne
 devas eniri dum la tago por ne sus-
 pektigi la homojn, por ke oni ne ek-
 sciu, kie loĝas la timigaj homoj, vi
 povus imagi, kiel mirigitaj estis ni
 vidante, ke ne unu aŭ du personoj
 eniras nian netuŝeblan loĝejon, sed
 preskaŭ ĉiuj komisaroj de Panagjuriŝ-
 te, ĉirkaŭ 10—12 personoj. Inter ili
 vidiĝis 25-jara junulo², nekonata al ni,
 kiu laŭ la bruniĝinta kaj polva vi-

¹ Baj — alparolo al pli aĝa viro.


² Tiu persono estis la kuriero de Koprivŝtica,
 sendita de Todor Kableŝkov kun letero por
 sciigi pri la okazintaĵo.



P. Volov



G. Benkovski
T. Kableškov



zaĝo kaj la ŝvita frunto evidente venis de longa vojo kaj tro rapidis.

La komisaroj marŝis kun klinitaj kapoj, enpensigintaj. Oni facile povis konkludi, ke la afero ne estas pura, ke io grava okazis.

— Preparu la revolverojn! — ekkriis Ikonov kaj ĉiuj ni tuj starigis kaj renkontis la komisarojn ĉe la pordo.

— Kio okazis, sinjoroj? Kion vi ja faras? Kial vi kolektigis tiom multe? — demandis ni unuvoĉe. — Ĉu perfido...?

— Ne estas tio. . . Sed la afero jam estas finita. . . — respondis la komisaroj post kelkminuta silentado.

— Ne turmentu min! Diru pli rapide! — kriis Benkovski tondre.

— Jam tri horojn la fusiloj en Koprivŝtica pafas! . . .

— La ribelo komenciĝis! — respondis Bobekov kun emocia voĉo.

— Kiu vidis tion? . . . Diru, fratoj, se vi estas veraĵ bulgaroj! — kriis la apostoloj.

— Leteron ni portas de Kableškov, subskribita per sango, — respondis kelkaj el la komisaroj.

Grandaj larmoj pluve ekfluis el la okuloj de ĉiuj. Ni unuvoĉe ekkriis: «Ribelo! Al armiloj!» Poste Benkovski sin ĵetis al Bobekov, prononcinta unue la vorton «ribelo», kisis lin surbuŝe kaj ne dirante eĉ vorton, ĉar tio estis neebla, turniĝis al siaj kamaradoj por ĉirkaŭpreni ankaŭ ilin, kiujn same larmoj surverŝis. . . Korduŝa estis la minuto! La komisaroj de Panagjuriŝte rigardis respektive la scenon, neniu kuraĝis moviĝi, ĉiuj silentis. Parolendaĵoj estis multaj, sed la emocio ne permesis, ĝi venkis kaj la racion, kaj la kuraĝon.

Mi ne kapablas prezenti la tutan majestecon de tiu bildo.

— La leteron de Kableškov! Rapide la leteron! — kriis ni unuvoĉe kaj ĉiu etendis manon por kapti tiun leteron.

Ĝi trafis la manon de Volov. Sed li ne sukcesis ĝin malfermi, ĉar liaj manoj ekstremis. El liaj manoj ĝin prenis kaj eklegis Ikonov, sed kiam li elparolis «Karaj fratoj», lia lango embarasiĝis, kaj nenion oni povis kompreni el tio, kion li legis.

La enhavo de tiu letero, kiun fine Benkovski tralegis laŭte, estis la jena:

„Fratoj!

Hieraŭ el Plovdiv alvenis en la vilaĝon Neĝeb aga, kiu volis aresti kelkajn personojn inkluzive min. Sciante pri via decido en la kunveno de Oboriŝte mi vokis kelkajn bravajn personojn kaj arminte nin ni direktiĝis al la konako³, atakis ĝin kaj mortigis la distriktestron kaj kelkajn policanojn... Nun, kiam mi skribas tiun ĉi leteron, la standardo

³ Konako — turka administrejo.



flirtas antaŭ la konako, la fusiloj pafas akompanate de sonado de la preĝejaj sonorilegoj, kaj la bravuloj kisas unu la alian sur la stratoj!... Se vi, fratoj, estas veraj patriotoj kaj apostoloj de la libero, sekvu nian ekzemplon ankaŭ en Panagjuriŝte...

Kopriovŝtica, la 20-an de aprilo 1876

T. KABLEŜKOV.*

Malsupre estis la jena noto:

„Mi estis atestanto de ĉio priskribita en la letero de Todor. Mi ekveturas al Kllsura por fari la samon.

N. KARAĜOV.*

— Ribelo! Ribelo! Rapide, Bobekov, kunvoku la centestrojn, frapu la sonorilegojn! Pafu kelkfoje por jam proklami la ribelon! Al armiloj! Kion vi atendas? Niaj fratoj jam batalas! — kriegis Benkovski kun tuta forto, kriegis ni ĉiuj. . .

— Ni atendu iomete! . . . Ni komprenu pli bone la aferon. . . Ankoraŭ ne venis la tempo, ni havas ankoraŭ nenion pretan, — provis kontraŭdiri la komisaroj, t. e. la panagjuriŝtanoj.

Ilia malforta, sed justa voĉo ne havis efikon. Ĝi restis voĉo en dezerto inter la teruraj pafoj de kelkaj fusiloj, kies kugloj timige fendis la aeron.

La komisaroj ne obstinis plu. La lotilo jam estis ĵetita. Ili rapide eliris dirante, ke ili iras por prepari kaj armi sin. Restis nur ni, la kvar apostoloj kaj la reprezentanto de Peruŝtica — V. Sokolski.

Ni ankaŭ ĵetis nin al preparo, por vesti nin en apostola formo, sed kie ni trovu ĝin, kiam nenio ankoraŭ estis preta?

Ikonomov jam tenis la standardon en la korto, kaj ni kun nudaj sabroj enmane baldaŭ enviciĝis apud li. . . Ĉiuj ni tremis kiel folioj. La vizaĝo de Benkovski ŝanĝiĝis. Li muĝis en siaj ordonoj kiel leono. Grandaj gu-

toj de ŝvito kovris lian altan frunton. Ekflugus li kiel aglo, se li havus eblecon pri tio. Kaj la nobla animo de Volov verŝis larmojn kaj kriis: «Rapide, fratoj! Malfermu la pordojn, por ke ni eliru! Ni fariĝu la unuaj viktimoj. . .»

La suno markis jam antaŭvesperon, kiam ni elflugis sur la straton kiel turnovento, kun nudaj sabroj enmane, kun verda standardo, nudpiedaj kaj senĉapaj, nur kvar personoj (la apostoloj). Elirinte sur la straton ni tuj ekkantis la ribelan kanton:

Hej popolo sklava,
kial dormas vi,
aŭ al vi ne karas
la libera viv' ? . . .

Ĉiu povas imagi, kian impreson faris nia apero sur la strato ne nur al la virinoj, al la infanoj, al tiuj, kiuj ne estis vidintaj nin, sed ankaŭ al iuj proksimaj konatoj. La strato estis senhoma. Tie kaj tie aŭdiĝis frapfermo de pordoj. Ni vidis iujn virinojn trapasi la stratojn kaj droni en la kortoj, de kie poste eligis siajn kapojn super la muroj por rigardi nin.

Ni paŝadis brave kaj en ĉiuj du minutoj ĉesigis la kantadon por unuvoĉe kii: «Ribelo! Ribelo! Ĉiuj al armiloj!» . . . La unua persono, kiu kuraĝis aperi antaŭ nin por gratuli kaj esprimi deziron pri bona sukceso de la sankta afero, estis la edzino de F. Ŝtârbánov. Tiu brava virino estis sukcesinta deŝiri kelkajn tigojn da geranio, kiujn disdonis al ĉiu el ni, kaj rapide revenis hejmen.

Ni iris al la centro. Post kelkaj minutoj ni estis jam ĉe la ponto de rivero Luda Jana, de kie vidiĝas la konako je distanco de 200—300 paŝoj trans la rivero. La gardantoj de la silento aŭ pli ĝuste la reprezentantoj de la sultana potenco, etendis sin plentrankvile antaŭ la konako, kuŝante surdorse je la suno sur kanapoj kun la kruroj supren. Ankaŭ

ilin la pafado en la domo de baj Ivan ankoraŭ ne timigis.

Nun, kiam ni jam staris antaŭ ili vizaĝ-al-vizaĝo, vekite de niaj kantoj ili rigardis fikse al ni kaj ne povis kompreni, kia speco de homoj ni estas. . .

Volov kaŭriĝis kaj pafis. Pafis ankaŭ ni. Kiam ekkakis niaj pafiloj, kaj la kugloj levis polvon ĉirkaŭ la kuŝantaj policianoj, ni ne plu vidis antaŭ ni homojn, sed iajn fantomojn, kiuj flugis. Ili faladis kaj leviĝadis, kurante sen ia ajn armilo.

— Ribelo, ribelo! Eliru! Kvin homojn jam koprivŝticianoj batalas! — kriis ni kaj marŝis tra la kvartaloj.

Post kelkaj minutoj ni renkontis sur la strato Ivan Popov, unu el la unuaj funkciuloj en Panagjuriŝte, armita de la kalkanoj ĝis la dentoj, kun rumana ĉapo surkape kaj verda geranio ĉe la orelo.

— Vivu Bulgario! — ekkriis li kaj eligis sian longan tranĉilon.

Ni respondis per konvenaj salutoj. . . Plue sur la strato montriĝis kontraŭ ni, anhelanta kaj ŝvitanta, la deputito de Pazargik — Sokolov, kiu ankoraŭ ne estis foririnta.

— Kisu, fratoj, unue mian revolveron kaj poste min, — li parolis proponante la sangan feron de sia revolvero, per kiu — laŭ liaj vortoj — li mortigis turkon antaŭ minuto.

— Gratulon, junuloj, gratulon! Dio kaj sankta Dipatrino helpu al vi! — elkriis kelkaj virinoj de iu pordo, preter kiu ni pasis.

En tiu tempo unu el la preĝejaj sonorilegoj ekeĥis eksterordinare. La pafado plifortiĝis kaj la norda vento portis la eĥon de diversaj bravulaj kantoj tra la vilaĝo, interrompataj ĉiuminute de tondraj vivuoj. La minutoj iom post iom estiĝis pli solenaj. Du personoj ni ekiris de la ponto, revenante ni nombris jam 20—30

personojn. Komuna interkizado, frataj brakumoj, larmoj ne de falsa fonto retumis ĉies okulojn.

Kiam ni alproksimiĝis al la placo ĉe la ponto, la tuta Panagjuriŝte jam tondris pro kantoj kaj vivuoj. Tie ni trafis amason da armitaj bravuloj. Tie estis ankaŭ la komisaroj, same Volov kaj Benkovski. La admiro kaj la ĝojo ne havis limojn. Sur la tero kuŝis 5—6 turkaj kadavroj, mortigitaj en diversaj partoj de la vilaĝo.

La amaso sur la placo pligrandigis ĉiuminute. Junuloj ornamitaj per geranio kaj bone armitaj alvenadis de ĉiuj flankoj. Kisoj kaj brakumoj vidiĝis ĉie, la sonorilegoj ankoraŭ ne eksilentis, patriotaj kantoj fendis la aeron, kugloj fajfis super la vilaĝo.

La batalantoj superis jam la nombron 500. Neniu komprenis, kiamaniere okazis la ribelo, pro kies komando kaj sub la timo de kia disciplino povis kolektiĝi tiom da homoj en tiel mallonga tempo. Ĉiu oratoris, ĉiu komandis kaj proponis, aĥis kaj oĥis, insultis kaj benis. Multaj oratoroj, inkluzive de Benkovski, volis fari paroladon, sed kiu aŭskultu? . . . 500 personoj parolis samtempe.

Pli ol unu horon la bravuloj staris sur la placo preskaŭ senage. Tio estis vere necesa, por ke oni ĝuu unu al alia, satparolu libere, intervidiĝu kaj interkonatiĝu en la nova unfiormo. La deputito de Bracigovo, kiu same ne estis ankoraŭ foririnta, iris por kolekti la restintajn proklamilojn kaj subskribi ilin per sango. Fakte neniu subskribis la proklamilojn. La ruĝa kruco, farita per turka sango, estis sufiĉa garantio pri ĉio.

Rapidaj kurieroj ekflugis por forporti tiujn proklamilojn al la kvar direktoj, kiel en la regiono de la IV distrikto, tiel ankaŭ al la aliaj: Târnovo, Vraca kaj Sliven.

El la bulgara: VIOLIN OLJANOV

LA HOMO, KIU DONIS LA SIGNALON

En li estis io Prometea. . . En lia brusto batis flamanta koro, plenplena de amo al la patrolando kaj la homoj. La boneco lumigis lian palan vizaĝon. Lia rigardo estis direktita al la estonto de la popolo, en kiu li kredis senfine. Lia tuta estaĵo elradiis nerompeblan volon, lia spirito estis plena de nobleco kaj digno. Liaj pensoj estis kristale puraj, la ideoj — helaj kaj altaj. Ĉe li ĉio estis natura. . .

Tia estis la patrioto, la revoluciulo, la homo, la humanisto Todor Kableŝkov — la heroo de la 20-a de aprilo 1876, proklaminta la ribelon, post kies frakaso eklumis la bulgara libero.

Todor Kableŝkov estas neripetebla historia persono, ĉe kiu ĉio estis ekvilibrita, kun mezuro, harmonia. Estis multo komuna inter li kaj lia granda kunfrato Vasil Levski, al kiu li tre similis morale.

Todor Kableŝkov naskiĝis la 1-an de januaro (malnovstile) 1851 en urbo Koprivŝtica. De infanaĝo li estis inspirita per rakontoj kaj kantoj pri la hajdutoj¹, kiuj vagis tra Sredna Gora² kaj la Balkanmontaro.

Li studis en sia naskiĝloko, poste en Plovdiv kaj fine en la franca linceo en Istanbul kaj havis altan instruitecon. Poste li laboris kiel telegrafisto ĉe la fervojo de barono Hirŝ kaj por kelka tempo estis estro de fervojstacio Belovo, distrikto de Pazarĝik. Antaŭ Todor Kableŝkov, filo de la granda ĉorbaĝio³ Lulĉo, ekzistis bonegaj eblecoj ricevi bonan oficon en la otomana imperio, vivi riĉe kaj plezurplene. Sed li forĵetis la delogojn de la persona bonfarto, vidante la suferojn de sia popolo, kaj ekiris la pezan vojon de la batalo por ĝia libereco kaj feliĉa vivo.

Sian revolucion agadon Todor Kableŝkov komencis en 1871 j. Tiam li unufoje renkontiĝis kun Vasil Levski. Al la batalo por libero li dediĉis multajn fortojn kaj fine — ankaŭ sian vivon. En 1876 j. Kableŝkov estis la animo de la revolucia komitato en Koprivŝtica. Dank' al li la apostola agado de Benkovski kaj Volov estis grave faciligita. Lia faro estis la revoluciaj komitatoj de urbo Klisura ĝis vilaĝo Ŝipka apud Kazanlâk.

Al Todor Kableŝkov apartenas la historia honoro doni la signalon por la ribelo, kaj Koprivŝtica ribelis la unua.

Dum la dek liberaj tagoj en Koprivŝtica Kableŝkov prezidis la revolucion konsilantaron de la ribelintoj. Li verve laboris por la defendo de la urbo, por enloĝigo kaj nutrado de la fuĝintoj el la ribelintaj kamparvilaĝoj, por organizo de batalhelpo al proksimaj loĝlokoj (Strelĉa, Klisura). Ĉe la kontraŭrevolucia puĉo, organizita de la ĉorbaĝioj de Koprivŝtica, Todor Kableŝkov, Panajot Volov, Najden Popstojanov, Tanĉo Ŝabanov kaj kelkaj aliaj el la pli elstaraj ribelgvidantoj de Koprivŝtica estis arestitaj. Per ruzaĵo Pavel Bobekov, Manĉo Manev kaj Orĉo vojevodo liberigis ilin. Tuj post tio Kableŝkov kune kun P. Volov, P. Bobekov kaj kelkaj aliaj ekkondukis la taĉmenton al la Balkano por daŭrigi la batalon. . . Dum kelktaga vagado tra la monto ĉe plej pezaj kondiĉoj — sen nutraĵo, ĉe malbona vetero (torentaj pluvoj, neĝo, malvarmo), en konstantaj embuskoj fare de la turkoj kaj pafbataloj kontraŭ ili, la ribelula grupo disiĝis. T. Kableŝkov, K. Popstojanov, Stefan Poĉekov kaj Georgi Târnev trovis rifuĝejon en ia kabano apud v. Ĉiflik, regiono de Trojan, sed estis atakitaj de la baŝibozukaj⁴ persekutantoj. En la pafbatalo Poĉekov kaj Târnev estis mortigitaj, Kableŝkov kaj Popstojanov — kaptitaj vivaj.

La du batalantoj por libero estis malliberigitaj en Trojan, poste translokitaj tra Loveĉ kaj Sevlievo al Târnovo. Ili estis submetitaj al nehomaj torturoj. Pro turmentoj kaj suferoj N. Popstojanov mortis en la malliberejo de Târnovo. La turkoj kondukis Kableŝkov al Plovdiv, esperante ke tie li malkaŝos multon gravan lige kun la ribelo, sed en Gabrovo la revoluciulo sukcesis ekkapti la pistolon de policano kaj sinmortigis (la 16-an de junio). Dum la tagoj de torturado Kableŝkov montris eksterordinaran obstinon kaj kiel vera patrioto defendis antaŭ la mondo la naciliberigan batalon de la bulgara popolo.

T. Kableŝkov pereis tre juna — 25-jara. Sed lia heroaĵo senmortigis lian nomon.

¹ Hajdutoj — malnovaj batalantoj kontraŭ la otomana jugo.

² Monto sude de Balkano; ĝi ĉirkaŭas la Rozan Valon de la suda flanko.

³ Ĉorbaĝio — riĉulo, reprezentanto de la bulgara burĝaro dum la otomana jugo.

⁴ Baŝibozuko — neregula turka soldataro.

Mia juneco apartenas al mia patrujo. . .

Todor KABLEŜKOV (1851—1876)

MIAJ GEAVOJ RAKONTIS. . .

En 1876 mia avo Kostadin, tiutempe havanta iom pli ol dudek jarojn, partoprenis la Aprilan Ribelon kontraŭ la otomana jugo. Li kaj liaj samvilaĝanoj de Kozarsko, forlasinte siajn domojn, iris en la pli grandan vilaĝon Bracigovo por batali komune por la libero kaj komune defendi sin. Tiucele en Bracigovo kolektiĝis ankaŭ la vilaĝanoj el ĉiuj proksimaj vilaĝoj.

Komenciĝis la unuaj bataloj. Proksime de Kozarsko la baŝibozuko estis rebatita. La bulgaroj ĝojis kaj ĝuis kelktagan liberecon. Sed alvenis regula turka armeo. La lignaj kanonoj de la ribelintoj tute ne povis konkuri kun ĝiaj ŝtalaj kanonoj. Ekboldis akra batalo. La turkaj obusoj eksplodis en la centro de Bracigovo. La trafitaj domoj ekbrulis. Homoj faladis kaj sur la batalpozicio, kaj en la vilaĝo. La ribelo estis frakasita. 141 ribelintoj estis mortigitaj. La gvidanto de la ribelo Vasil Petleŝkov estis bruligita viva antaŭ la okuloj de la popolo. Multaj ribelintoj estis pendumitaj. Oni arestis ĉiujn junajn kaj fortajn virojn, sed ne forĝis ankaŭ la junajn virinojn. Kiam oni vicigis la arestitojn por konduki ilin for, la bejo¹, kiu kontrolis la preparadon por ekmarŝo, rimarkis inter la arestitoj lamantan junulon. Tio estis mia avo.

— Hej, gjaur²! Kial vi lamas?

— Bej efendi³, de infaneco mi tiel lamas, — respondis Kostadin.

— Nu, for de tie ĉi! Lamulojn mi ne bezonas!

Kostadin prenis sian unujaran filon el la manoj de sia edzino Ivanka, kiu ankaŭ estis en la kolono, kaj flankeniĝis.

Ekmarŝis 251 gesklavoj — viroj kaj virinoj, fraŭloj kaj fraŭlinoj, ĉiuj junaj, fortaj, sanaj. Ekeĥis ploroj kaj vekrioj — pro doloro, pro kompato, pro aflikto, pro timo antaŭ la nekonata sorto de la arestitoj. Oni disigis edzon de edzino, patron de gefiloj, fraton de fratino, ĉar la turkoj ne arestis tutajn familiojn. Al ili estis necesaj junaj, sanaj, fortaj kaj viglaj viroj — por labori en iliaj bienoj, kaj junaj, belaj virinoj — por iliaj haremoj.

La kelktaga ĝojo kaj triumfo cedis lokon al la angoro, angoro senfina, senlima. . . Ĉiu bone komprenis, ke la karajn proksimulojn li certe neniam plu vidos.

Post longa kaj laciga piedmarŝado, malfruvespere la arestitoj alvenis en Plovdiv. Oni ĵetis ilin en la prizanon „Taŝkapija“. La prizono jam estis plena de arestitoj. Mankis loko eĉ por sidiĝi. Kelkajn tagojn post tio inter la arestitoj ekflamis epidemio de abdomena tifo. La malsanulojn oni ne apartigis de la sanaj homoj. Medicinan hel-

Nia celo ne estas ataki la malriĉajn kaj subpremitajn vilaĝanojn, sendepende ĉu ili estas bulgaroj aŭ turkoj. Ni ribelis ne kontraŭ la mahometanoj ĝenerale, sed kontraŭ la sangonsoifantaj paŝaoj kaj kadioj (juĝistoj), kiuj estas komunaj malamikoj de ambaŭ popoloj.

*

Mia celo estas jam atingita! En la koro de la tirano mi faris tian akran vundon, kiu neniam resaniĝos.

Georgi BENKOVSKI (1841—1876)

pon la arestitoj ne ricevadis. Nur la mortintoj havis la rajton forlasi la prizonon. Kaj per tio komenciĝis kaj finiĝis la sanitaraj zorgoj. La morto triumfis. Ĉiutage estis enterigataj mortintoj. Post du monatoj „Taŝkapija“ jam ne estis tiel plena — la plej granda parto de la arestitoj ripozis poreterne en komunaj tomboj.

Iun tagon la pordego de la malliberejo larĝe malfermiĝis kaj aŭdiĝis ordono:

— Ĉiuj eliru kun siaj pakajoj!

Sur la korto viciĝis en kolono ĉirkaŭ cento da arestitoj. Ilin la morto indulgis. Malgrasaj kaj malfortiĝintaj pro malsanoj kaj malsato ili ekmarŝis al Anatolio (Malgranda Azio). Ankaŭ Ivanka estis tie. Kie ilin trafis la vespero, tie ili noktumis. Finfine ili atingis urbon Edirne (Odrin). Tie la arestitoj denove estis ĵetitaj en prizonon. Post kelktaga restado tamen ili aŭdis anoncon:

— Alvenis sultana dekreto por via liberigo. Nu, eliru kaj revenu hejmen! Vi estas liberaj!

La pordego de la prizono estis larĝe malfermita. Eliris homoj konsumitaj de malsanoj, de longa piedirado, de nesufiĉa nutrado dum la kelkmonata aresto. Kaj denove marŝado sen groŝo en la poŝo, sen pano kaj nutraĵo, sed kun firma volo sukcese reveni hejmen.

En ĉiu vilaĝo ili rakontis pri la ribelo, pri siaj suferoj kaj sorto. La vilaĝanoj aŭskultis komplete, invitis ilin al siaj domoj por ripozo kaj noktumo, donis al ili nutraĵon. Post longa kaj peza marŝado Ivanka kaj aliaj virinoj revenis en Kozarsko. Sed ili ne trovis siajn domojn. Dum la ribelo la tuta vilaĝo

estis cindrigita. La homoj loĝis en provizoraj terkabanoj aŭ en kabanoj faritaj el ruboj restintaj post la incendioj. Kostadin ankaŭ loĝis en kabano. Malgrasa, sed persistema, Ivanka helpis al li plibonigi la kabanon kaj pretigi ĝin por la vintro. Kostadin kaj Ivanka, kiel ĉiuj vilaĝanoj de Kozarsko, ne perdis la esperon pri la proksima libereco. Ili firme kredis, ke baldaŭ venos Avo Ivan⁴ kaj liberigos ĉiujn bulgarojn.

Ne pasis du jaroj kaj la granda revo fariĝis realo. En unu frosta, sed suna vintra tago de 1878 sur „Sbiriŝkata“ (la centra vilaĝa placo) ekstaris nekornataj homoj kun neviditaj ĝis tiam uniformoj kaj kun tornistroj sur la dorsoj. La rusoj, la rusoj, venis! — fulmrapide disvastiĝis la novaĵo tra la tuta vilaĝo.

Dum kelkaj minutoj la placo pleniĝis de homoj. La vilaĝanoj kun larmoj ĉirkaŭprenis siajn liberigantojn, ornamis ilin per geranio, kiun ili eltrovis sub la neĝo, portis nutraĵon, vinon, brandon. . . Ĉiu strebis proksimiĝi al rusa soldato, tuŝi liajn vestojn, lian bajoneton. . . Kisoj kaj brakumoj abundis ĉie sur la placo, sur la apudaj stratoj. Kaj ĉie eĥis kantoj kaj krioj:

— Avo Ivan! Avo Ivan venis! Dankon, niaj rusaj fratoj! Dankon eternan! . . .

¹ Bejo — turka regionestro.

² Gjaur — tiel la turkoj nomis la nemahometanojn.

³ Sinjoro bejo.

⁴ Tiel la bulgaroj ame nomis la rusan popolon.

Pli bone unu minuton da libero ol jarcenton da sklava vivado.

*

Kiam ni diras „la popolo“, ni komprenas: „ĉiuj bulgaroj, escepte la ĉorbaĝiojn“.

Georgi RAKOVSKI (1821--1867)



VERDA TABULO

En la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1976 j. distingĝis:

1. ASJA KARAJAN el Varna — kolektis 102 abonojn.

En la tuta distrikto de Varna estis kolektitaj 176 abonoj (76 por 1975!).

2. NIKOLA GODEV el Velingrad — kolektis 81 abonojn.

La redakcio dankas kaj varme salutas ilin!

75-JARA JUBILEO DE LA E-MOVADO EN PLOVDIV

La 14-an de marto okazis granda jubilea celebrego de la 75-a jariĝo de la organizita E-movado en Plovdiv. En la koncerta halo de la Partia Domo kolektiĝis multnombra publiko el lokaj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto, gastoj el alilokaj E-societoj, distriktaj E-komitatoj kaj el la Estraro de BEA.

Detalan raporton pri la E-movado en Plovdiv faris prof. Pejĉo Pejĉev. Li notis, ke la dato 14-a de februaro 1901 brilas per oraj literoj en la historio de Esperanto en Plovdiv. Tiam estis fondita la unua loka E-societo sub la nomo „Stelo“, kiu post la Unua Mondmilito estis alinomita „Kulturo“ kaj tia ĝi restas ĝis nun. Prof. Pejĉev substrekis la gravan progresivan rolon, kiun ludis la E-movado en Plovdiv en la batalo kontraŭ la monarko-faŝismo kaj ĝenerale por la edukado de la esperantistoj en spirito de vera demokratiismo, internacia amikeco kaj pacamo.

Sekvis salutparoladoj. En la nomo de la Distrikta Komitato de la Bulgara Komunista Partio kaj la Distrikta Popola Soveto gravan rekonon de la nobla kaj popolutila agado de la esp-istoj en Plovdiv esprimis k-do Atanas Janev — vicprezidanto de la Soveto. Li bondeziris novajn, ankoraŭ pli grandajn sukcesojn.

Varme salutis la esp-istojn de Plovdiv k-do Kunĉo Vălev — sekretario de CK de BEA. Li substrekis la aparte gravan fakton, ke la E-movado en Plovdiv neniam izoliĝis en malvasta rondo de abstraktaj humanistoj, revantoj kaj utopiistoj, sed ĉiam estis parto de la tutpopola batalo kontraŭ la reakciaj fortoj — antaŭ la 9-a de septembro 1944, kaj por la konstruado de nova, socialisisma socio en nia lando — post la popola venko. La unua generacio de esp-istoj en Plovdiv donis grandajn figurojn kiel Georgi Oreŝkov, Georgi Atanasov, Rajĉo Rajĉinov, Dimitro Malĉev, Ilija Bobĉev k. a. Ĉi tie pli ol duonjarcenton agis la pioniro Penko Stoev. Esperanto penetris profunde en la laboristan klason de la urbo, fariĝis parto de la progresema ideologio. Aparte notinda estas la agado de la loka sekcio de la Laborista E-Asocio (LEA). Esperanton lernis kaj uzis plej elstaraj gvidantoj de la komunista movado en la urbo kaj la distrikto: la sekretario de DK kaj membro de CK de BKP Ĥristo Koĉev, kruele mortigita en la Direkcio de la Polico en Sofio (1931), la sekretario de DK de Kom-somolo Ivan Armin, la sindona batalanto-komunisto kaj esperantisto Mitko Surlev — pafmortigita de faŝistaj dungitoj en Sofio



(1933), k. a. En la heroa kontraŭfaŝisma batalo (1941—44) pereis kun armilo en la manoj la esperantistoj Georgi Ječev — membro de DK de BKP, komandanto de II partizana zono, la estroj de partizanaĵa taĉmentoj Kosta Aleksandrov-Koŝuh, Ivan Filev kaj Cvetan Cvetanov, la politikaj komisaroj de partizantaĉmentoj Dimitro Petrov — Fanteto, Argir Stoilov, Rajčo Kirkov k. a., la estro de batalgrupo Stojan Ŝiŝkov, la partizanoj Nedelčo Nedelčev — Jan, Rajčo Germanov, Vasil Kirjakov, Kiril Tomov, Vlado Cvetanov, Spiro Vasilev k. a.

Alvokante la esp-istojn de Plovdiv sankte gardi la glorajn revoluciajn tradiciojn de la esp-istoj el la antaŭaj generacioj kaj plenforte, entuziasme partopreni la konstruadon de nova, feliĉa vivo en nia Dimitrov-patrolando, k-do Vălev en la nomo de CK de BEA dekoris la brustojn de E-veteranoj kaj hodiaŭaj aktivuloj de E-societo „Kulturo“ per la ora, arĝenta kaj bronza insignoj de BEA. Al la societo-jubileanto li enmanigis aparaton por kopiado.

Gratulojn al la esp-istoj de Plovdiv esprimis ankaŭ la reprezentantoj de DK de Patrolanda Fronto, de Distrikta Packomitato, de multaj distriktaj E-komitatoj kaj E-societoj, kiuj ankaŭ enmanigis memordonacojn al „Kulturo“.

Fine oni aplaŭde akceptis telegramojn al CK de BKP kaj CK de BEA.

La impona jubilea solenaĵo finiĝis per riĉa kaj varia belarta programo, plenumita de profesiaj kaj amatoraj artistoj.

Maria Panova

Nova gelernanta E-societo

Dediĉe al la 75-jariĝo de la organizita E-movado en Plovdiv, la 15-an de februaro — fondiĝis nova, tuturba gelernanta E-societo. Ĝi ricevis la nomon „Kolombo“. Kiel prezidantino estis elektita Rosica Ĉumova kaj kiel sekretario — Tonka Dimitrova.

P. P.

AKTIVECO DE „DANUBA STELO“

Dank' al la helpo de la Urba Komitato de la Bulgara Komunista Partio en la ĉedanuba urbo Sviŝtov la loka E-societo „Danuba Stelo“ komence de 1976 ricevis klubejon, en kiu la societa estraro tuj aktive eklaboris. En la klubejo ekfunkciis du E-kursoj por komentantoj, ĉiu kun po 30 partoprenantoj. Estis aranĝita ekspozicio el E-korespondaĵoj kaj aliaj E-materialoj. Aparte notinda estis la ekskurso al la pereoloko de la komunistoj Andrej Nenov, Angel Jordanov kaj Stanka Stojanova — ĉiuj el v. Pejĉinovo, situanta 35 km de Sviŝtov. La unua el ili, Andrej, estis fervora esperantisto. La esperantistoj de „Danuba Stelo“ prezentis florkronon antaŭ la monumenton de la pafmortigitaj fidelaj popolaj gefiloj.

Poste en la vilaĝo okazis renkontiĝo kun la parencoj de Andrej Nenov, liaj kamaradoj kaj la eksa partizano Vasil Petkov, esperantisto, kies edzino Bojka ankaŭ falis de ĝendarmakuglo. V. Petkov rakontis pri la partizana vivo kaj batalo. Post la interesa konversacio kaj rakonto la gastoj disdonis E-insignojn kaj aliajn memordonacojn al la kamaradoj de Andrej. La ĉeestantaj estraranoj akceptis la peton de la vilaĝa partia komitato helpi la junulojn lerni Esperanton — „la lingvon de Andrej“, kaj deklaris, ke somere la esperantistoj de Sviŝtov organizos brigadon „Andrej Nenov“, kiu helpos la kooperativanojn en la kamplaboro. La esperantistoj inde plenumos la labortaskojn en siaj entreprenoj kaj oficejoj. Pere de Esperanto ili aktive kreos ligojn kun homoj en la tuta mondo por batali kune por paco kaj homa feliĉo.

Aparte vigle partoprenas la vivon de „Danuba Stelo“ laboristoj, teknikistoj, inĝenieroj kaj oficistoj el la nova granda kemia kombinumo „Sviloza“, kies gvidantaro rilatas tre favore al Esperanto kaj subtenas la E-societon.

Sider Pavlov

La patrujo kaj la libero de la homo estas pli karaj ol ĉio.

*

Kiel por la teraj animaloj estas necesa la aero kaj por la fiŝoj — la akvo, samtiel por la homo estas necesa antaŭ ĉio libero.

*

Ne estas en la mondo io pli alta kaj pli nobla por la homo ol batali por homaj rajtoj, por la libero de la personeco kaj por la feliĉo de siaj proksimuloj, sen serĉi rekompencojn pro tio. Nur en tia batalo montriĝas la homa karaktero kaj la vivo havas grandan belecon.

*

Popolo, kiu ne deziras liberon por la aliaj, mem ne povas esti libera.

*

La liberon oni ne ricevas donace, sed oni ĝin prenas, ĉar ĉio donacita tre rapide perdas sian signifon.

Ljuben KARAVELOV (1835—1879)

E-societo „Paco“ en u. Bjala, distrikto de Ruse, ĉiujare antaŭeniras. Dediĉe al la 39-a nacia E-kongreso ĝiaj membroj plimultiĝis de 80 je 120. La plejmulto de ili abonis „Bulgaran Esperantiston“.

Nun en la urbo funkcias kvar senpagaj E-kursoj, gvidataj de la E-veterano Simeon Baltaĝiev: en la junpionira domo — 10 lernantoj, en la gimnazio — 12 lernantoj, en la entrepreno „Peĉatni Platki“ — 20 laboristoj, kaj en la presejo — 11. Ĉiuj gekursanoj estiĝas regulaj membroj de la societo.

Okaze de la 116-a naskiĝtago de d-ro Zamenhof S. Baltaĝiev aperigis artikolon en la urba gazeto „Septemvri“ kaj prelegis pri li per la loka radioreto. En la klubejo ni aranĝis solenaĵon, kie pri Zamenhof parolis la E-veterano el Ruse Stefan Popov.

Okan jaron ni eldonis nian jam tradicion E-poŝkalendareton, nun 48-paĝan. Ĝin ni disdonas senpage al la membroj de la societo kaj dissendas al multaj E-societoj.

Nun ni intencas eldoni albumon-adresaron de la esperantistoj en nia urbo. Nia E-societo „Paco“ proporcie al la loĝantaro de la urbo (10 000) estas je la unua loko en nia lando kun siaj 120 regulaj membroj.

Ivan Severinjaŝki

Dum la Semajno de Internacia Amikeco la E-societo „Ivan Vladkov“ en Drjanovo aranĝis grandan ekspozician vitrinon el E-leteroj kaj materialoj, ricevita el USSR, Hungario, Pollando, Ĉeĥoslovakio, GDR, Rumanio, Francio, Danlando, Kanado, Japanio kaj aliaj landoj el ĉiuj mondpartoj. Estis montritaj ankaŭ lernolibroj kaj vortaroj, uzataj de la esp-toj. Centre de la vitrino estis la Promeso de la esperantistoj de Drjanovo lige kun la 11-a kongreso de BKP kaj la 39-a kongreso de BEA plialtigi kaj vastigi plue sian internacian korespondadon por popularigi eksterlande nian patrujon kaj la socialismajn atingojn de nia popolo, por plue kontribui al la firmigo de amikeco kaj paca kunlaborado inter la popoloj.

En la ekspozicio partoprenis per siaj materialoj la geesperantistoj Geno Manev, Jonka Nikoevska, Donka Gateva, Stefka Dimitrova, familianoj Petrov — Rosen, Valentina, Liljana kaj Petro. Per siaj unuaj E-leteroj partoprenis ankaŭ Iv. Penĉeva kaj M. Ivanova — el la E-kurso, nun gvidata de Liljana Petrova en la urbo.

Miloj da urbanoj kaj gastoj de la urbo kun intereso trarigardis la ekspozicion, aranĝitan en vitrino de la domo, kie troviĝas UK de BKP. Ĝi altiris novajn amikojn de Esperanto.

Inĝ. P. Petrov

Bona tradicio enkadre de SIA

En la Sofia Universitato „Kliment Ŭhridski“ okaze de la Semajno de Internacia Amikeco (SIA) anakŭ ĉi-jare estis organizita la jam tradicia Vespero de la Esperanto-Verkaro.

Siajn originalajn verkojn kaj tradukojn legis niaj E-poetoj kaj verkistoj Simeon M. Simeonov, Miĥail Ĉobanov, Ljuba Bojaĝieva, Lili Koleva, Nadeĵda Ĵejnova, Stefan Kadiev, Marin Petkov k. a.

Rajna Arnaudova, Vera Vaĵarova kaj K.

Vălev recitis verkojn de Asen Grigorov, Penka Batoeva kaj Stojan Kostadinov.

Bonege variigis la programon per siaj kanzonoj la E-kantisto Miŝo Zdravev, akompanate per gitaro de L. Bojaĝieva. Virtuoze ludis je violono Joana Strateva.

La vespero vekis helajn pensojn kaj sentojn pri la amikeco inter la popoloj, pri la paco sur la tero kaj donis estetikan ĝuon al ĉiuj ĉeestantoj.

Ana Mindova

E-NOVAĴOJ EL RIGA

Post bonega somera ripozo en la Sovetunia E-Junulara Tendaro (SEJT) kaj la Baltlanda E-Tendaro (BET) niaj klubanoj kun nova, ĝis nun nevidita entuziasmo ekagis sur la E-kampo. Oni komencis per multaj prelegoj por neesperantistoj por varbi ilin al kursoj. Pli ol 300 homoj ĉeestis en 15 prelegoj, akompanitaj de ekspozicioj. Aperis 18 priesperantaj materialoj en nia gazetaro. Nun sukcese funkcias kursoj ĉe la Riga Domo de Instruistoj. Ni aranĝis

**TRA LA
E★
MONDO**



por niaj klubanoj 19 ekskursojn, vesperojn kaj turismajn marŝojn, dum kiuj la novaj klubanoj bone praktikis la lingvon. 14 niaj esperantistoj partoprenis diversajn aliklubajn aranĝojn kaj du veturis eksterlanden. Sukcese finiĝis la abonado al E-revuo.

Jam pli ofte oni aŭdas pri la junulara klubo pere de la radio: pri ni disaŭdigis la Riga Radio, la Pola Radio kaj radiocentroj de diversaj uzinoj kaj institutoj. La gvidantino de la Koresponda Servo de SEJM Saulcerite Neilande gajnis la ĉefan premion de la Pola Radio. La Latva Televido pli volonte akceptas informojn pri Esperanto. Jam aperis la unua sciigo en la rubriko „Panorama“, ke la Riga Junulara E-klubo gajnis la duan lokon en la socialisma konkurado inter la junularaj E-klubo de Sovetunio.

En la novjara ĝenerala kunveno de la klubanoj, kiu finiĝis per distra balo, oni decidis labori ankoraŭ pli aktive, pli fruktodone. Tiuvespere estis fondita nova fako — ĵurnalista, kiun ĝvidos la honora membro de la Junulara E-klubo en Riga Golds, sperta ĵurnalisto. Ekfunkciis ankaŭ traduka, poezia kaj metodika fakoj — en Esperanton oni tradukis multajn novajn kantojn el la latva, eldonis 120 ekzemplerojn de „Eta E-latva vortareto“. Ni resu-

„PARNASO 74—75“

En la tradicia poezia konkurso de la Junulara E-Klubo en Riga partoprenas ĉiam pli kaj pli da esperantistoj. Siajn verkojn sendis E-poetoj el GDR, Ĉeĥoslovakio, FRG, Pollando, Hungario, Nederlando, Bulgario, Rumanio kaj multnombre el Sovetunio. La ĵurio havis neatendite grandan laboron. Longe ĝi ne povis distribui la premiojn. Jen la finaj rezultoj pri la periodo aprilo 1974 — oktobro 1975:

- a. Unua premio — ne aljuĝita.
- b. Dua premio: Gercikov G. (USSR) — versaĵo «Logas min kara land»;
- Ŝilas V. (USSR) — versaĵo „La movado“.
- c. Tria premio: H. Trunte (FRG) — versaĵo „Vesperigo“.
- ĉ. Surpriza premio: G. Berveling (Nederlando), kiu sendis sian verkon „La geniulo“ tuj post la apero de la anonco en „Esperanto“.

„PARNASO — 76“

La poezia konkurso „PARNASO 76“ celas aktivigi junajn E-poetojn kaj ĉiujn, kies koroj junas kaj kiuj ne povas silenti pri la beleco de la nuna vivo, pri la amo, pri la mirinda naturo kaj nia E-movado.

Ĉiuspecaj originalaj poeziaj verkoj laŭ libera temo estu sendataj ĝis la 15-a de junio 1976 j. al adreso: Aristids Medinŝ, 222002, Riga 2, Ed. Smilga 34—5, Latvio, USSR.

Bonan inspiron al ĉiuj!

mis ankaŭ la rezultojn de la konkursoj „PARNASO 74—75“.

En oktobro okazis nia tradicia, tre interesa renkontiĝo „Riga — Tallinn“, kiun krom talinanoj kaj riganoj partoprenis ankaŭ samideanoj el Jurmala, Ogre, Jelgava, Liepaja, Jaunaŭce. La poetino L. Jevsejeva interese prelegis pri la historio de la E-poezio. Oni aŭskultis magnetofonan bendon pri renkontiĝo en Leningrad, kie gastis la prezidanto de UEA H. Tonkin. Efektiviĝis ankaŭ aliaj entreprenoj: ekskursoj tra antikva Riga, vizito de „Doma“ - katedralo kaj aŭskulto de orgena koncerto, seriozaj interparoloj pri la kluba kunagado kaj la aranĝo de la tre utila esperantista renkontiĝo „Esperanto kaj naturo“ en Latvio. Ĝis nun ĝi ĉiam okazis en Estonio, sed ĉi-jare liepajanoj kune kun talinanoj decidis aranĝi ĝin ĉe ni. Nun ni komencas laboron por bona aranĝo de „Negfloketo 76“ — nia Junulara E-Kongreso.

Aristids Meduinŝ

LA ESPERANTISTARO DE KLAIPEDA HONORAS PEREINTAJN HEROOJN

Jam pasis pli ol 30 jaroj de tiu tempo, kiam ĉesis la bataloj por liberigo de la lasta litova urbo kaj marhaveno Klaipeda el sub la jugo de hitleranoj. Definitive finiĝis pli ol 700-jara germana okupado de tiu litova urbo.

La bataloj por liberigo de la litova havenurbo tamen estis tre malfacilaj kaj postulis multe da viktimoj. Preskaŭ 6000 sovetaĵ soldatoj pereis en la ĉirkaŭaĵoj de Klajpeda.

Post la milito en nia urbo estis konstruitaj kelkaj monumentoj, ordigitaj militaj tombejoj. Ĉi tie dum ŝtataj kaj popolaj festoj alvenas klajpedanoj, prezentas florojn, kronojn — honoras la pereintajn heroojn.

Sed unu monumento altiras precipe multe da vizitantoj. Ĝi troviĝas sur Kurŝa Terlongo, en Alksnine, 9 km de Klaipeda. Ĉe tiu monumento oni akceptadas infanojn en la vicojn de la junpioniroj, ĉi tie oni enmanigas biletojn al junkomunistoj.

Alksnine estas loko, kie la 29-an de januaro 1945 batalis alteriĝinta grupo de 30 sovetaĵ soldatoj. Ĉiuj ili estis volontuloj — memvole iris al vera morto por detranĉi la lastan vojon al Königsberg (nun Kaliningrado) por la remarŝantaj hitleranoj. La batalo estis tre malfacila, la fortoj de la nazioj multfoje superis la alteriĝintojn. Restis vivaj nur kelkaj, sed la hitleranoj estis haltigitaj. Sep kuraĝuloj postmorte estis honoritaj per la plej supera grado — heroo de Sovetunio.

En Klaipeda E-klubo fariĝis tradicio ĉiujare, en la Tago de la Soveta Armeo, aranĝi piedmarŝon al Alksnine por meti kronon. Ankaŭ ĉi-jare multnombra delegitaro subgvide de

II-A KONGRESO DE LA ĈEĤAJ ESPERANTISTOJ

La dua kongreso de la ĉeĥaj esperantistoj okazis je la 8—9-a de februaro en Prago.

Krom kelkcentoj da ĉeĥaj esp-toj la kongreson partoprenis oficialaj gastoj el kelkaj socialismaj landoj, kiuj frate salutis la kongresanojn: K. Válev (Bulgario), R. Graez (GDR), M. Kék (Hungario), B. Staszczak (Staŝĉak — Pollando),

Raportojn pri la agado post la unua fonda (fakte refonda) kongreso faris la prezidanto kaj la sekretario de ĈEA — la k-doj Josef Vitek kaj Zdenek Křimski (Křimski). Ambaŭ raportintoj substrekis gravajn atingojn: konstanta kresko de la aŭtoritato de ĈEA antaŭ la Nacia Fronto kaj la popola registaro, kvanta plimultiĝo kaj plifortiĝinta idea unueco de ĝia membraro, sukcesa disvastigo de Esperanto pere de ĉeestaj E-kursoj ĉe civitanaj, lernejoj, oficejoj kaj uzinaj E-kluboj, per korespondaj kaj someraj, ankaŭ eksterlande konataj, internaciaj E-kursoj, aktiva libroeldonado ktp.

En la agadplano ĝis 1980, kiun la kongreso akceptis, estas antaŭvidite: pliaktivigi la laboron celantan informi la eksterlandan esperantistaron kaj la ceteran publikon pri la atingoj de la ĉeĥa popolo en la socialisma konstruado, pri ĝia arda deziro vivi en paco kaj kunlaboro kun ĉiuj popoloj en la mondo, pri ĝiaj kulturaj kaj historiaj valoraroj ktp.; konservi kaj sekvi la progresemajn tradiciojn de la ĉeĥa laborista E-movado; aktivigi la agadon de la E-sekcioj, donante apartan atenton al la Instruista, Teknikista kaj Fervojista Sekcioj; fondi plue E-grupojn ĉe la kulturaj institucioj de la naciaj komitatoj (adjekvataj al la popolaj sovetoj en Bulgario), ĉe la uzinaj kaj oficejaj kluboj de la Revolucia Sindikata Movado, ĉe la organizaĵoj de la Nacia Fronto kaj la Socialista Unuiĝo de la Junularo kaj intensigi ilian agadon kune kun ĉiuj ĉi organizaĵoj kaj institucioj.

En la nova Centra Komitato la postenon de prezidanto donove okupis k-do J. Vitek, kaj de sekretario — Zdenek Křimski.

La dua kongreso de la ĉeĥaj esperantistoj donos certan puŝon antaŭen al la tuta ĉeĥa E-movado.

K. Válev

La kluba prezidanto V. Banjulajtis, ree piedmarŝis kaj metis ĉe la monumenton tradician verdstelano kronon, kie sur la rubando estis surskribo litove kaj Esperante. Per minuta silento ĉiuj memoris la pereintajn heroojn.

H. Vajtkevićus

BULGARA—NEDERLANDA AMIKECO

En la kadro de la Semajno de Internacia Amikeco en la muzeo pri instruado en Hago okazis Bulgara-nederlanda semajno. Ĝi estis organizita pere de hagaj esperantistoj, la bulgara esperantistino Rajna Stanĉeva el Ŝumen, kiu gastis en Hago dum du monatoj, kaj la bulgara ambasado en Nederlando.

La aranĝo konsistis el malferma festvespero kaj tutsemajna ekspozicio. Dum la festvespero cento da ĉeestantoj ĝuis bulgarajn folklorajn kantojn kaj melodiojn, kiujn ludis nederlanda triopo sub la gvido de s-ro Swets, uzante malnovajn bulgarajn instrumentojn. Ses junaj membroj de la haga danctrupo „Baluta“ kun sukceso demonstraciis speciale pro la aranĝo studitajn bulgarajn dancojn (helpe de la bulgarino Coneva). S-ro Breddels, reprezentanto de la E-centro Nederland, nederlandlingve informis la publikon pri la signifo de la Semajno de Internacia Amikeco kaj enkondukis la ambasadon konsiliston s-ron Kumanov, kiu parolis franclingve. S-ro Kumanov interalie malkaŝis, ke li antaŭ 26 jaroj lernis Esperanton, kaj je la fino de sia salutparolado deklamis poemon en la internacia lingvo, pro kio li ricevis laŭtan aplaŭdon de la ĉeestantaj esperantistoj.

Post la paŭzo, dum kiu okazis kaŝtrinkado, „Balkanturist“ montris kolorfilmon pri la alloga feria lando Bulgario. Sekvis denove folkloraj muziko kaj dancoj. La lastan dancon partoprenis ankaŭ la publiko.

La festa malfermo de la semajno finiĝis per dankvortoj de s-ino Stanĉeva. Ŝi speciale adiaŭis la esperantistojn, gastigintajn ŝin dum ŝia restado en Hago, kaj invitis ĉiujn al la 63-a UK de Esperanto en Varna en 1978.

Dum la tuta semajno hagaj esperantistoj deĵoris ĉe la E-stando en la muzeo kaj disdonis turismajn broŝurojn kaj prospektojn pri Bulgario. Aparte menciinda estas la grava kunlaboro en la aranĝoj de s-ro Vernoolj, kiu ankaŭ tradukis nederlandlingven la paroladon de s-ro Kumanov.

Miloslawa van der Norst-Kolinska

Forpasis tute juna, apenaŭ 17-jara

Ivan Ĵivkov Marinov

el Velingrad, lernanto, membro de E-societo „Stoju Kalpazanov“.

Entuziasma esperantisto, filo de nia s-ano Ĵivko Todorov, Ivan laboris sindone per Esperanto por la feliĉo de nia popolo, por paco kaj amikeco inter la popoloj en la tuta mondo.



VENTO BRUAS

Kanto de la bulgaraj ribelantoj

Teksto: Dobri Ĉintulov

Traduko: Stefan Kiraĝiev

Marŝo



Ven-to bru-as en mon-ta-ro, sur ĉe-val' bra-vu-lo vo-kas per trum-pet' bul-ga-rojn: Ar-mu vin, ku-nu-loj! Hej, ve-sis ki-kvin ĝu, cent-ve-nis ŝtorm', For sklave-co, ti ra ne co! Ar-mu-vin, ku-nu loj, jam!

Vento bruas en montaro
sur ĉeval' bravulo
vokas per trumpet' bulgarojn:
Armuj vin, kunuloj!

Refreno:

Hej, leviĝu, venis ŝtorm',
pasis kvincentjara dorm'.
For sklaveco, tiraneco!
Armuj vin, kunuloj, jam!

Kiu havas koron bravan,
nomon de bulgaro,
zonu sabron, prenu glavon,
kaj flirtigu flagon!

Refreno

Kiu pretas morti glorie
por popolo sia,
lian nomon en memoro
gardos la Patrio!

Refreno

KONCIZE

● Ĉiujare de la 1-a ĝis la 10-a de junio — jam 17-foje — en Hispanio okazas Internacia Foiro de Barcelono. Sian oficialan afiŝon ĝi eldonas ankaŭ en Esperanto.

Jam 10-an jaron la Direkcio de la Foiro disponigas al la Hispana Esperanto-Instituto standon kiel informojn pri la Internacia

Lingvo.

● En sia n-ro 1 de la 28-a de januaro ĉ. j. ĵurnalo „L-Horizont“, aperanta en Malta, publikigis sufiĉe longan artikolon „Stara Zagora — urbo de poetoj“ de la bulgara ĵurnalistoj Venjo Vasilev. La traduko estas farita el Esperanto de s-ro Nazzareno Caruna.

ВАЖНО!**НОВО!**

Искате ли да посетите братска Полша, използвайте есперантската самолетна линия «Д-р Заменхоф» и автобусната линия «Антони Грабовски».

През лятото на 1976 г. ще бъдат организирани 10 групи по 28 души от цялата страна при следната програма:

Група №	ВАРШАВА (дни)	ЛОДЗ (дни)	ПОЧИВЕН ЦЕНТЪР (дни)	ГДАНСК (дни)	ВАРШАВА (дни)
ЕЛП—21	25—26.06	26—28.06	28.06—5.07	5—8.07	8—9.07
ЕЛП—22	2—3.07	3—5.07	5—12.07	12—15.07	15—16.07
ЕЛП—23	9—10.07	10—12.07	12—19.07	19—22.07	22—23.07
ЕЛП—24	16—17.07	17—19.07	19—26.07	26—29.07	29—30.07
ЕЛП—25	23—24.07	24—26.07	26.07—2.08	2—5.8	5—6.08
ЕЛП—26	30—31.07	31.07—2.08	2—9.08	9—12.08	12—13.08
ЕЛП—27	6—7.08	7—9.08	9—16.08	16—19.08	19—20.08
ЕЛП—28	13—14.08	14—16.08	16—23.08	23—26.08	26—27.08
ЕЛП—29	20—21.08	21—23.08	23—30.08	30.08—2.09	2—3.09
ЕЛП—30	27—28.08	28—30.08	30.08—6.09	6—9.09	9—10.09

В програмата са отразени само главните градове, в които ще се намира. Предвижда се да бъдат разгледани с помощта на полски ескурзовод-есперантист и селищата, през които се преминава.

Седмичното пребиваване в почивния център включва: предиобед — изучаване на есперанто в курсове за начинаещи и напреднали, следобед — излети и екскурзии, спорт и развлечения в международна есперантска среда. Предвижда се първите две групи да бъдат в гр. Функа, вторите две — в гр. Тлен, петата група — в гр. Бидгощ, а останалите пет групи — в гр. Шелмица.

Таксата за участие е 250 лз., която включва пълната издръжка от София до Полша и обратно (за 15 дни). Освен това всеки може да внесе до 150 лз. за джобни пари.

Сумите изпращайте с пощенски запис на адрес: Смолян — Окръжен комитет на Българския есперантски съюз, а телеграми на адрес: Смолян — Есперанто. Отделните ОК на БЕС могат да съставят групи от по 28 души, като събират сумите и общо ги презеждат.

Разноските по оформянето на паспортните документи не влизат в горната такса, а те са 11,25 лз. на лице. За улеснение при издаждането на паспорта следва на документите да се пише «без валута».

ОК на БЕС — СМОЛЯН

STATA LIGNO-PRILABORA UZINO „GEORGI DIMITROV“ — TROJAN

Produktaĵo:

ĉiuj specoj de ligno-fibrecaj platoj por la mebla industrio;

ĉiuj specoj de lakitaj, truitaj, kvadratfacitaj kaj striitaj platoj, tipo „Rogozka“ (Mato) por plattegado de salonoj, kabinetoj kaj vestibloj;

ĉiuj specoj de krucoplakaĵoj, tabuloj dikaj kaj por pakumo.

La produktaĵo de la uzino estas bone akceptita kiel en nia lando, tiel ankaŭ en eksterlando.

*Telefonoj: direktoro 23—83
debitfako 22—78*

